

Eduard Ebel,
Milde falas la
neĝ'

tradukita de N. N. 01

Milde falas la neĝ',
Lago silentas en preĝ',
Arboj en brilblanka
vest'.
Ĝoju pri kristnaska
fest !

Nun varmiĝas la kor',
Ĉesas ĉagren' kaj do-
lor',
Ĝoju pri Dia ĉeest'.
Ĝoju pri kristnaska
fest!

Sankta nokto de Di',
Vekas anĝelhoron ĝi,
Sonas ĉarmega atest':
Ĝoju pri kristnaska
fest'!

*Traduko de la Germana
poemo "Leise rieselt
der Schnee" de EDUARD
EBEL (Eduardo Ebelo,
*1839 - †1905) en Espe-
ranton de N. N. 01.*

*MR-012-NN-1 / Arg-
99-201 (2003-12-11
08:46:13)*

MR-012-NN-1

Eduard Ebel,
Neĝas nun ĉie ĉi

*tradukita de Manfredo
Ratislavo*

Neĝas nun ĉie ĉi,
lagon kovras glaci',
brilas kristnaske ar-
bar'.
Ĝoju vi, ho kristanar'!

Varma estas la kor',
malaperas dolor',
venas savant' de l' ho-
mar'.
Ĝoju vi, ho kristanar'!

Malleviĝis la sun',
sankta nokt' estas nun,
kantas por ni anĝelar':
Ĝoju vi, ho kristanar'!

*Traduko de la Germana
poemo "Leise rieselt
der Schnee" de EDUARD
EBEL (Eduardo Ebelo,
*1839 - †1905) en Espe-
ranton de MANFREDO
RATISLAVO (Manfred
Retzlaff, Stettiner Str.
16, D-59302 Oelde, Ger-
manio, *1938-11-04).*

*Arg-99-199 (2003-12-11
08:30:04)*

MR-012-3

Eduard Ebel,
Ŝvebas neĝ el
aer'

*tradukita de Joachim
Gießner*

Ŝvebas neĝ' el aer',
nun ripozas la ter'.
Mondo en brilblanka
vest',
ĝoju, ja venos krist-
fest'.

Varma lum' en la kor',
for ĉagreno kaj plor',
ĉesas de l' viv' la mo-
lest',
ĝoju, ja venos krist-
fest'.

Baldaŭ nokto de l'
glor'.
Kaj el ĉielo la ĥor
Sonos en dolĉa majest',
Goju, ja venos krist-
fest'.

*Traduko de la Germana
poemo "Leise rieselt der
Schnee" de EDUARD
EBEL (Eduardo Ebelo,
*1839 - †1905) en Espe-
ranton de JOACHIM
GIESSNER (*1913-12-
23 - †2003-11-25).*

*MR-012-JG-1 / Arg-
99-200 (2012-12-24
16:27:56)*

MR-012-JG-1

Eduard Ebel,
Flustre falas
la neĝ'

*tradukita de Josef
Kühnel*

Flustre falas la neĝ'.
Lag' rigidas laŭ leg'.
Kristfeste brilas ar-
bar'.

Ĝoju pri Kristo, ho-
mar'!

Varma estas en kor'.
Foras ĉiu dolor'.
Fuĝas la vivoamar'.
Ĝoju pri Kristo, ho-
mar'!

Sankta nokta lumbril'
kaj ĉiela jubil'
logas laŭ ĉarma fan-
far':
Ĝoju pri Kristo, ho-
mar'!

*Traduko de la Germana
poemo "Leise rieselt der
Schnee" de EDUARD
EBEL (Eduardo Ebelo,
*1839 - †1905) en
Esperanton de Josef
Kühnel.*

*MR-012-JK-1 / Arg-
99-202 (2010-09-18
19:50:56)*

MR-012-JK1